
# la Riverego

ISSN 0830-9574

Bulteno de Esperanto-Societo Kebekia

Aprilo 1986. Numero 2-a. Jarkolekto 1-a.




IBERVILA RENKONTIĜO:

renkontiĝloko

(5-6 de aprilo)

## redaktore

Nu, printempo estas la sezono de riveraltiĝoj. Male, *La Riverego* havas nur kvar paĝojn, anstataŭ ok pasintfoje. Mi ne diros la ordinarajn pretekstojn. Mi nur esperas, ke ĝi estos venontfoje pli dika.

La ĉefa temo de tiu ĉi numero estas ankoraŭfoje la Ibervila renkontiĝo. Ĝis nun, nur malmultaj homoj aliĝis. Ĉu kulpas la informmaniero? Prave, ne ĉiuj E-istoj en Kebekio estas ESK-anoj, kaj tial ne povis scii pri Ibervilo. Sed estas en ĉiu klubo ALMENAŬ unu ESK-ano, kaj oni devus paroli pri tiaj okazontaĵoj. Sed ni jes pritraktos tiujn temojn en la venonta numero, pri la lokaj kluboj.

Kaj eble, dum la riveroj estos malaltaj, *La Riverego* iĝos pli dika.

Saluton.

*La Riverego* estas eldonata de Esperanto-Societo Kebekia. Aperas trimonate. ISSN 0830-9574.
Dépôts légaux: bibliothèques nationales du Québec et du Canada: 1er trimestre 1986.
Redaktoro: Sylvain Auclair.
Senpage por la membroj de ESK.
Por aliaj: jara abono: 5 $, aerpoŝte: 6 $.
UEA-kodo: kebk-d.
Adreso: Société québécoise d'Espéranto
C.P. 126, succ. Beaubien.
Montréal, Québec
KANADO H2G 3C8

# Ibervilo

Jen lastatempaj informoj pri la Ibervila renkontiĝo. La kuniĝo okazos sabaton, je la 13-a horo, ĉe la preĝejo St-Athanase, 500, 1ère rue, Iberville. Estos babilado. Je la 15-a, ni vizitos la regionon kaj la urbon, kaj eĉ estos akceptataj de la urbestro.

Vespere, estos, kiel jam dirite, amuza vespero. Notu, ke la vespermanĝo NE estas inkluzivita en la prezo. Ni verŝajne mendos ion.

NOTU ankaŭ, ke la loĝigo dumnokta ankaŭ ne estas inluzivita. Multaj Montrealanoj intencas reveni dormi hejme. Eblas ankaŭ dormi en motelo. (Ni rekomendas "La belle Rivière"; mem rezervu: (514) 347-5561).Kelkaj Ibervilaj E-istoj povos ankaŭ gastigi kelkajn homojn.

DIMANĈON, kiel planite, okazos nur la acera manĝo. Mateno estos libera.

TIUJ, kiuj venos nur sabaton, pagu nur 5 $. Por dimanĉo, pro la manĝo, estos 10 $. Se estos demandoj, TUJ telefonu al ESK ((514) 495-8442).

# Membrokarto

La membrokarto estas preta. Vi trovos ĝin en la koverto, en kiu vi ricevis tiun ĉi *Riveregon*. Se vi jam forĵetis la koverton, tuj ekserĉu ĝin...Se estas eraroj, bv. sciigi tion al ni.

# Somere

La venonta numero de *La Riverego* havos temon: lokaj kluboj. Estas kluboj en Montrealo (2), en Kebeko, en Ŝerbruko kaj en Ibervilo. Tuj apud Kebekio, estas Otavo. Ni vidu, kiel ili fartas.

REVENAS MI

FAIS DU FEU DANS LA CHEMINÉE

Neĝadis re ĉe l'Ekvator'
Pluvetis nur ĉe la bankiz'
Ne plu laboras la kastor'
Ĉielo bluas en Pariz'

Ho kara, strangas la sezon'!
Eliru ne, ke ŝirmu l' pord'
Kirliĝas mondo sen rezon'
Jen gela Sud', kaj ŝvita Nord'

*Faru fajron en la kamen'*
*Venas mi al hejm'*
*Gravas nur la varmeco en*
*Gravas nur ni mem*

La Sejno ŝajnas dum junaĝ'
Kaj sensufera pro veter'
Mi sekvas ĝin kaj sen vilaĝ'
Laŭiras tra la atmosfer'

Ho kara, strangas mia kor'
La tempo rejunigas min
Deziras ne mi pro rigor'
Soleci dum la vintra fin'

Post mia granda vivvojaĝ'
Rememoraĵon de valor'
Kunportas mi en la pakaĵ'
La emon pri ĝardenlabor'

*Faru fajron en la kamen', venas mi al hejm'*
*Vintro povas foriri jam, gravas nur la am'.*

tradukis: Georges Lagrange.